

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



9

SOFIA — SEPTEMBRO 1961

E N H A V O

	Paĝo
* * * — Ni organizu la novan lernejon! .	1
D. Armand — Letero el USSR	2
H. Levi — Por balkana interkompreniĝo kaj unueco .	2
D-ro J. I. Kanevskaĵa — Maksim Gorkij pri Esperanto	3
G. Dimov — La ŝipo „Zamenhof“ gastas en Varna . . .	4
D-ro St. Kadiev — Sporto kaj hardiĝo de la maljunuloj	5
Ivan Keremidĉiev — Esperov — La kranio	6
Georgi Dikovski — Naŭa de septembro	10
Violin Oljanov — Aŭtuno . . .	10
Andrej Pânĉev — Generalo Cvjatko Radojnov .	10
Atanas D. Atanasov — Ada — Lecionoj por lingva perfektiĝo	12
TRA LA GAZETARO	14
Josef Chvosta — Esperanto en Ĉeĥoslovakio	14
ORGANIZA VIVO .	15
NI RECENZAS	
Nano Nanov — Monto de la virino	17

Abonkotiĝo: jara — 14 levoj, duonjara — 7 lv. Por eksterlando — 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro.

Reklamtarifo: 5 levoj por cm²; korespondanoncoj: 0,5 levoj por tiu vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 1000 lv.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANO: Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23: Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bucureşti 5

SOVETUNIO: J. Kudrjavickij, PK 1255, Moskva K-9.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.

Frontpaĝa bildo: Momento de gimnastikaj ekzercoj



NI ORGANIZU LA NOVAN LERNOJARON!

La somero estas jam en sia fino. Baldaŭ ekestos la aŭtuno. La kamparanoj jam rikoltis aŭ daŭrigas rikolti la fruktojn de sia laboro. Nun ni, la esperantistoj, komencas semi kaj post la semado ni ankaŭ devas esti pretaj rikolti la fruktojn de nia semado — la sukcesojn de niaj kursoj. Ni devas tuj, senprokraste komenci la bonan organizadon de la nova lernojaro — ni devas komenci la bonan preparon de niaj kursoj. Krom la kursoj ni devas pripensi la pli bonan organizon de la kultur-kleriga agado de la societoj. La asocio preparis kaj sendis kaj daŭrigos sendadi diversajn prelegojn, sed ankaŭ la societaj estraroj povas kaj devas prepari aliajn, laŭ la lokaj kondiĉoj konvenajn prelegojn je plej diversaj temoj. Por altiri la atenton de la socio al niaj aferoj anticipe ni devas pripensi la organizon de propaganda semajno. Nia movado en la pasinteco havis tian bonan tradicion. Ni rekomendas al la societoj en la fino de septembro aŭ en la komenco de oktobro bone organizi la propagandan semajnon kaj post ĝi malfermi la kurson aŭ la kursojn. La societaj estraroj ne devas atendi de la Centra Komitato de BEA specialan cirkuleron pri la organizo de propaganda semajno, sed laŭ la lokaj kondiĉoj tuj oni devas komenci ĝian organizadon.

Niaj someraj Esperanto-kursoj en vilaĝo Drujevo donis al nia movado novajn 40 spertajn kursgvidantojn. Ni esperas ke en la aŭtuno ili iniciatos viglan propagandan kaj klerigan laboron en multaj lokoj de la lando kaj tio puŝos antaŭen nian kursan aferon.

Ni proponas al la societaj estraroj jam en la komenco de la nova lernojaro kune kun la okupoj pri la lingvo konatigi al la societaj membroj kelkajn plej aktualajn problemojn, al kiuj la ĝenerala socia intereso estas vigla. Do la societaj estraroj devas organizi plej variajn aranĝojn de socieduka kaj kulturkleriga laboro: prelegojn, ekskursojn, intersocietajn renkontiĝojn, amuzvesperojn, konkursojn, laborbrigadojn, kolektivajn vizitojn kaj priĝisdiskutojn de filmaj kaj teatraj spektakloj ktp.

Se ni bone organizos la propagandan semajnon, ĝi rekompencos nin per abundaj fruktoj. Se ni ĝustatempe kaj bone organizos nian kulturklerigan kaj sociedukan laboron ni ricevos la rekonon de nia agado flanke de la tuta socio.

Do ni tuj komencu bone organizi nian novan lernojaron!

Moskvo, la 15-an de julio 1961

Kara kamarado,

Bonvolu pardoni al mi, ke mi ne povis respondi ĝustatempe. Nun ankoraŭ la 22-a Kongreso de la Komunista Partio, ni ĉiuj estas treege okupitaj pro volontulaj memdevigoj, kiujn ni prenas sur nin. Ekzemple mi devas kompili (el ĉirkaŭ 15 artikoloj) kaj pretigi por eldonejo artikolaron „Bilanco, racia ekspluato kaj restarigo de la naturaj riĉfontoj de USSR“. La tasko estas interesa kaj utila kaj mi elspezas ĉiun mian forton kaj tempon por ke mi povu ĝin plenumi ĝustatempe.

En la fendoj de mia okupiteco mi penas enŝovi esperantan laboron. Dum la kuranta jaro mi prelegis dufoje: 1) en la Geografia Societo pri la transskribo de esperantaj geografiaj nomoj kaj 2) en la Geografia Eldonejo pri la aperinta ĝis nun geografia literaturo en Esperanto. Dum la lasta prelego ni organizis grandan Esperanto-ekspozicion. Ekzistas eta ŝanco, ke rezulte de tio oni eldonos iun geografian libron en Esperanto.

Ni, sovetiaj geografoj-esperantistoj revas kompili Esperantan Geografian Terminaron.

Kore vin salutas: prof. d-ro **D. ARMAND.**
Akademio de la Sciencoj
en USSR, Moskvo

POR BALKANA INTERKOMPREENIĜO KAJ UNUECO

La balkanaj landoj memoras multajn nigrajn tagojn de suferado en sia historio. Tiu „pulvora deponejo“ de Eŭropo, kiel ofte oni sin esprimas parolante pri ĝi, estis por la imperiistoj grava bazo por milita kaj ekonomia ekspansio al la landoj de Proksima Oriento.

En la sama tempo la balkanaj landoj estis objekto de kruela ekspluatado flanke de la imperiistoj. La avidaj al profitoj imperiistoj per almozdonacoj starigis registarojn tie, kiuj estis nur pupoj en iliaj manoj. Oni flamigis la ŝovinismon kaj la nacian malamikecon, malhelpante la liberan evoluon de la balkanaj landoj.

La interesoj de la balkanaj popoloj estas plej komunaj kaj reciprokaj. Malgrandaj landoj ili estas. Samaj maroj lavas iliajn marbordojn. Tra ili pasas komunaj vojoj, samaj riveroj kaj montaroj. Riĉa tero, malnova historio, laborema popolo — jen kion oni povas

diri pri ĉiu el ili. Ĉiuj cirkonstancoj helpas al la interkompreniĝo kaj al najbara kunlaborado, al riĉa kultura kaj ekonomia interŝanĝo.

Ne vane la plej konataj sociagantoj, verkistoj kaj sciencistoj, pri kiuj tiuj popoloj fieras, estis la plej flamaj partianoj por daŭra paco en la Balkanoj, por interkompreniĝo kaj kunlaboro inter la popoloj en la Balkana duoninsulo. Ili esprimis la intiman deziron de la popoloj ke la Balkanoj progresu en paco.

Vera kondiĉo por atingi tiun esperon aperis post la Dua Mondmilito, kiam parto de la balkanaj popoloj — (albana, bulgara, rumana) ekiris la vojon al socialismo. Ili fariĝis grava faktoro por normaligo de la situacio en la Balkanoj.

Bedaŭrinde la jaroj post la Dua Mondmilito ne likvidis la minacon por la paco. Lerninte nenion de la pasinteco la turka kaj greka registaroj forte

kunligis sin kun siaj novaj, sed danĝeraj mastroj — la usonaj imperiistoj, kiuj kreis en iliaj landoj militbazojn. Dank'al kontraŭpopola politiko en tiuj landoj denove floras la ŝovinismo kaj malamo kontraŭ la pacamaj popoloj de la socialismaj landoj. Bedaŭrinda fakto estas, ke en tio iufoje helpas la malamiĝojn de la Balkana interkompreniĝo la gazeto „Nova Makedonija“, eldonata en Skopie. Antaŭ nelonge ĝi kalumniis nian landon ke ni bulgarigas la grekojn, kiuj venis el Pollando. Inter la balkanaj landoj ne ekzistas problemoj, kiuj ne povus esti solvitaj laŭ pacmaniero. Nia lando, ankaŭ Rumanio kaj Albanio multfoje esprimis sian varman deziron — la Balkanoj estu zono de paco, sen militbazoj, sen nukleaj armiloj. Nia socialisma registaro gvidata de pacaj kaj koraj intencoj servi al la popoloj multfoje proponis subskribi pakton kun Grekio por neinvado, por ekonomia, kultura, teknika kaj scienca kunlaborado. Bedaŭrinde la proponoj de Rumanio kaj Bulgario ne estas ankoraŭ akceptitaj de la turkaj kaj grekaj registaroj. Sed oni ne devas dubi, ke tio ne povas daŭri longe. La ideo por

Balkana interkompreniĝo kaj unueco havas fortan kaj solidan bazon inter la popoloj mem kaj inter la progresema parto de la politikistoj kaj ekonomiistoj.

La fonditaj en ĉiuj balkanaj landoj komitatoj por Balkana interkompreniĝo kaj kunlaborado vigle laboras subtenataj de la plej granda parto de la popoloj ankaŭ en Grekio kaj Turkio. La renkonto de tiuj komitatoj balkanlandaj en Ateno dum aprilo 1961 plejdis por paco en la Balkanoj.

Sinsekvaj kaj fidelaj partianoj al tiuj ideoj estas la balkana esperantistaro. Ni, la esperantistoj de la balkanaj landoj estas varmaj subtenantoj al internacia frateco kaj interkompreniĝo. Multaj estas la ekzemploj en la pasinteco kiam la esperantistoj balkanlandaj semis senlace la grajnajn de la amikeco kaj kunlaborado en la nomo de la paco. Sed pli ol kiam ajn antaŭ la balkana esperantistaro staras nun la grava tasko streĉi siajn fortojn por servi ĉiam pli kaj pli bone al la ideoj de la interkompreniĝo kaj paco.

H. LEVI,
Ĵurnalisto

MAKSIM GORKIJ PRI ESPEPANTO

D-RO J. I. KANEVSKAJA

profesoro pri medicino

Maksim Gorkij — konvinkita adepto kaj amiko de Esperanto—ne unu fojon parolis profunde pri la Internacia Lingvo Esperanto. Nun mi volas sciigi el miaj rememoroj pri tre karakteriza epizodo nenie menciita ĝis nun.

Vintre 1920. Komisiono sub la prezido de Gorkij transprenas la Domon de Scienculoj — tiun saman konstruaĵon, kie ĝi ankaŭ nun troviĝas. Ni estas en la biblioteko de la palaco de grandduko Vladimir Aleksandroviĉ. Gorkij, kiel ĉiuj, en pelto kaj gantoj

(la palaco ne estis hejtita), trarigardas la librojn.

Repliko de profesoro el Militmedicina Akademio N. A. Ivanov: „En ĉiuj lingvoj estas skribitaj libroj: estus necese koniĉiujn aŭ krei komunan, internacian, por ĉiuj kompreneblan lingvon.“

Gorkij akre alturniĝinte: „Tia lingvo ekzistas, profesoro. Ĝi estas Esperanto. La scienculoj devas ĝin ekposedi kaj instrui ĝin al la popolo. Simpligi la ekzistantajn lingvojn estus sencele.“

LA ŜIPO „ZAMENHOF“ GASTAS EN VARNA

Kun granda ĝojo la esperantistoj de urbo Varna eksciis pri la alveno de la pola ŝipo „Zamenhof“, kiu depost 1959 fiere naĝas tra maroj kaj oceanoj. Ĝi estas vera markastelo kun konstante flirtanta verdstela flago—simbolo de paco kaj amikeco inter la popoloj.

La 4-an de aprilo ĉi-jare 45 geesperantistoj el Varna havis la feliĉon viziti la ŝipon „Zamenhof“ kaj pasigi kelkajn agrablajn horojn inter la gastamaj polaj maristoj. La ŝipestro k-do

Wozny estis afabla akcepti nin kaj montri al ni la modernajn instalaĵojn, kiuj garantias al la ŝipo trankvilan kaj feliĉan naĝadon. En speciala kajuto estas granda portreto de Zamenhof.

Por rememoro de la unua vizito de ŝipo „Zamenhof“ en la haveno de Varna ni donacis al la kapitano belan bildon de la urbo — la perlo de Nigra Maro kaj por la ŝipa biblioteko — la romanon „Sub la jugo“ de Ivan Vazov.

Georgi DIMOV

ĈU IMITINDA EKZEMPLO?

B. Angeluŝev



La imperiistoj deziras imiti la ekzemplon de Hitler,
sed ili devas memori la rezulton.

SPORTO·KAJ HARDIĜO DE LA MALJUNULOJ

Ĉu la regula kontakto kun la naturo, la ĉiutaga okupado per korpa kulturo kaj laŭsistema hardiĝo povas konservi la sanon de la maljuna homo kaj rejunigi la plenaĝan homon? Ĉu ili povas redoni al la maljunigintaj histoj la junecan flekseblecon kaj kapablecon?

La scienca kolektivo, konsistanta el la aŭtoro mem, d-ro Dimităr Kočankov kaj d-ro Bojana Ivanova observadis dum unu jaro ĉirkaŭ cent maljunajn homojn, en aĝo inter 60 kaj 80 jaroj, pri kies aktiva okupado per fizika kulturo kaj hardiĝo ili firme sciis. Kiel kontrola grupo oni havis antaŭvideiliajn samaĝulojn, jam delonge portantaj la sigelon de la maljuneco: kurbiĝintaj dorsoj, tremantaj manoj, malfortaj, atrofiĝintaj muskoloj, neflekseblaj artikoj, malrapida, nefirma marŝado, facila laciĝo ĉe malgranda streĉado.

La observitaj aktivaj gimnastikantoj havis tute alian aspekton. Ili tuj distingigis per sia vigla, rekta startenado, sia vivoĝoja rigardo. Ĉe neniu inter ili la manoj tremadis. La forto de la muskoloj, mezurita per speciala aparato — dinamometro — montris forton inter 120—130 kg., kiel ordinare la forton de 40—45 jaraĝaj viroj. Neniu inter ili estis tro grasa. Oni observadis ilin ĉe sufiĉe granda fizika ŝarĝado, sen rimarko de iaj signoj pri facila laciĝo aŭ sufoko. Estis evidente, ke ilia sangovaza sistemo estas en bona ordo, en multe pli bona stato ol ĉe iliaj samaĝuloj, negimnastikantaj. Preskaŭ ĉiuj havis vivoĝojan rigardon al la vivo. Pli ol la duono inter ili ne suferis pro malvarmumaj malsanoj dum la lastaj 15 jaroj.

La plej granda parto inter ili estis regulaj ekskursantoj sur la montaroj.

Alia parto faris regule ĉiutagan gimnastikon. Kelkiuj enkondukis en sian vivregimon ĉiutagajn promenadojn en la arbaroj aŭ eĉ al proksimaj vilaĝoj, tramarŝante po 5—8 kilometroj piede, praktikante samtempe profundan respiradon, plej ofte tie, kie la aero estis pura, freŝa, riĉa je oksigeno.

Aparte bone hardiĝintaj estis la maljunuloj, kiuj regule praktikadis akvajn procedojn. Kelkiuj inter ili, hardiĝante laŭgrade dnm longa tempo, atingis al tio, ke ili surverŝis sian korpon per malvarma akvo ne nur dum la somero, sed ankaŭ dum la aŭtunaj kaj vintraj tagoj. Aliaj aplikadis frotadon per malseka tuko. Ceteraj estis adorantoj de la akva sporto, gastadis ĉe la marbordo, naĝis en basenoj je centoj da metroj. Kelkiuj okupadis sin per ĝardenkulturado.

Ili ĉiuj, senescepte, estis utilaj por siaj familioj. Laŭ sia aspekto, memsenito kaj laborkapableco ili korespondadis al homoj pli junaj ol ili je 10—15 jaroj. Ĉi tiun junecan staton de ilia organismo oni konstatis ankaŭ per laboratoriaj esploroj ĉe la Instituto pri Korpa Kulturo. Ĉi koncernis: ŝanĝo de la oksigeno kaj de karbodioksido, pulmokapacito, elektrokardiogramo, sangopremo, pulsfrakvenco, haŭta provo pri la hardiĝo. En la Instituto por Specialigo kaj Perfektigo de la Kuracistoj oni faris biokemiajn provojn pri la kalko, fosforo, nolestereinhavo kaj ĉiam konstatis dimensiojn, korespondantajn al multe pli junaĝaj homoj.

D-ro Stefan KADIEV

eksteretata scienca kunlaboranto
ĉe la Instituto pri Fiziologio ĉe
la Bulgara Akademio de la
Sciencoj

Ivan Keremiĉiev — Esperov

LA KRANIO

— Vaĉjo, vi havas leteron — diris mia patrino, enirinte la ĉambron kaj donante al mi bluan koverton.

Mi rigardis ĝin. Krom la poŝtaj sigelajoj sur ĝi vidigis ankaŭ: Plevena distrikta malliberejo. Kontrolita. La adreso estis skribita per grandaj, vertikalaj literoj. Konata skribmaniero. Mi kriis pro ĝojo:

— Panjo, panjo! De Stojĉo. Ŝvinjara.

Mi disŝiris senpacience la koverton. Mia patrino sidigis ĉe la fenestro sur la lignoliton, enigis la trikilojn en la ŝtrumpon, kiun ŝi trikis kaj levis la okulvitrojn super sian sulkigintan fruncon.

Mi malfermis la leteron. Multloke estis makuloj de blua krajono. Mi eklegis kun malkvieta voĉo:

„Kara Vanĉjo,

Jen nun mi skribas al vi. Pardonu, ke mi prokrastis mian respondon por esprimi mian dankon pro via frata helpo. Mi ne estas kulpa. Mi ricevis ĉion senditan. Dankon, koran dankon ankaŭ al via panjo, onklino Penka. La lanaj ŝtrumpoj kaj la flanelo, kiujn ŝi trikis, preskaŭ savas min de la malseko. Vi scias en kiajn malbonajn kondiĉojn ni estas metitaj. Nur unu leteron mi rajtas skribi en la monato. Kaj ofte — ankaŭ ĝi perdiĝas.“

Ĝuste mi intencis daŭrigi kaj mi vidis, ke mia patrino turnis sin al mi kaj ĝemspiris profunde:

— La malfeliĉa knabo!.. — He-e, filo! Ja mi diris al vi! Sed. . . vi ne volas obei mian konsilon. Vi apenaŭ savigis de la malliberejo. Kaj li montrigis obstina kiel sia mortinta patro. Ja. . . la piro ne falas malproksime de la arbo. Legu plu.

La vortoj de mia patrino, esprimitaj per tia malĝoja voĉo, ankoraŭ pli konfuzis min. Mi sentis ion pezi en mia gorgo. Mi tusetis, por reguligi mian voĉon kaj daŭrigis la legadon, rigardante mian patrinon. Ŝi delasis sin ĉiam pli kaj pli. Sur ŝia malgrasiginta vizaĝo kuris grandaj, kristalaj larmoj. Ŝi disviŝis ilin per la manplato sur la vizaĝo.

Ankaŭ miaj larmoj, pene detenataj, nebuligis miajn okulojn. Apenaŭ mi trovis fortojn por fini la legadon de la letero.

.. . transdonu al ĉiuj intimuloj kaj amikoj miajn flamaĵajn salutojn. Kaj al vi firme mi premas la manon.

Via malnova kamarado — Stojĉo.

„P. S. Saluton ankaŭ al onklino Penka. Diru al ŝi, ke ŝi ne ĉagrenu multe pro mi. Ankaŭ la granda poeto kaj revoluciulo Botev tiel skribis al sia patrino. Ofte mi rememoras pri ŝi, kiu diradis al mi: „Ho, freneza kapo! Ankaŭ vi fariĝis kiel via patro, Stojĉo-o. Ja la piro ne falas pli malproksime de la arbo.“ Vere! Vanĉjo, tiel okazis. . .

Vanĉjo, ĉu vi rememoras kelkiam pri tiu timiga tago kaj pri la historio kun la kranio kaj ŝvinjara?

La sama.“

Mi ĉesis legi. En la ĉambreto aŭdigis la obtuzaj singulto de mia patrino, kiuj skuis ŝin, la tiktako de la vekhorloĝo kaj la pulsado de la koro en la tempio.

Ni ambaŭ silentis, ne rigardante nin.

— Jes. . . Ni ne ĉagrenu!. Per mortiga laboro ni vartis vin. . . por ke vi putru. . . en la malliberejoj. . . — Ŝi ne detenis sin kaj ekploris laŭte.

Kvietiginte iom, mia patrino levis la kapon kaj demandis, ĵetinte rigardon sur la leteron:

—Nu, pri kia „historio kun kranio“ skribas Stojĉo?

— Ĉu vi ne scias pri tiu ĉi okazintaĵo, panjo? Delonge estis ĝi. He-e-e!..

— Bone, Vanĉjo, Rakontu ĝin al mi, filo.

— Bone. Tamen... nekonvene estas nun. Vi estas malkvietiginta. . .

Mia patrino leviĝis kaj artefarita rideto briletis sur ŝia vizaĝo. Ŝi donis al si trankvilan ŝajnon kaj diris al mi, metinte la okulvitrojn sur siajn ankoraŭ malsekajn okulojn:

— Nenio, nenio. Parolu! Mi trikos kaj aŭskultos. Mirige! Kial vi ne parolis al mi pri tiu ĉi okazintaĵo.

Ŝi fleksis turkmaniere siajn gambojn kaj komencis triki sian forlasitan ŝtrumpo. Rigardante fikse ŝiajn tremantajn maldikajn fingrojn, kiuj lerte kaj sperte movis la trikilojn, mi penis rememori la pasintajn infamajn jarojn. Tiuj rozkoloraj, senzorgaj tagoj de ludoj kaj petoloj, kiuj estigas ĝojan senton, miksitajn kun dolĉa turmento.

Infanoj estis ni tiam — petolemaj, malkvietaj. Tiam la familio de Stojĉo loĝis proksime al ni. Kaj ni kun Stojĉo estis nedisigeblaj amikoj. Ni tutan tagon transsaltis kaj surrampis la ŝtonajn krucojn en la malnova tombejo. Ni detruis la birdajn nestojn, iliajn ovojn trinkis, kaj kun la malgrandaj birdidoj, nefinkreskintaj ankoraŭ, ludis ĝis kiam ili mortis. Tutajn horojn ni banadis nin en la riveroj Lom kaj Danubo, ŝtelis fruktojn, sed nia plej ŝatata ludo tiutempe estis „svinkja“*. Pasiĝinte pri tiu ĉi ludo, ni ludis, ĝis kiam ni rompis ies kruron, ies kapon aŭ ĝis kiam ni interbatalis per la bastonoj.

La patro de Stojĉo ofte riproĉis nin. Onklo Petro, bone konata en tiu ĉi regiono, estis granda, fortika viro. Kaptinte ĉe la orelo sian filon, duonkolere, kun patra riproĉo parolis al li, skuante sian grandan, malalte tonditan kapon.

— He, freneza kapo! Ŝvinjar** — ĉu vi komprenas? — porkbredisto fariĝos vi. Jen, mi diraŝ al vi! . .

Sur la supra makzelo de onklo Petro mankis du antaŭaj dentoj kaj parolante, la sono s aŭdiĝis kiel ŝ.

Pli malfrue, dum unu terura septembra nokto, li malaperis senpostsigne.

Kaptita li estis kun pafilo en mano preter la kazinoj, peze vundita. Oni parolis, ke li estis mortigita kune kun multaj ribelintaj kamaradoj kaj enterigita en la sablo de rivero Lom.

Stojĉo obeis al sia patro kaj tre amis lin, sed sian ludon „svinkja“ li ne rezignis.

Iun tagon nia grupo da samklasanoj forkuris la lastajn du horojn el la lernejo kaj iris al la rivero por bani sin. Ni estis certaj, ke se oni malkovrus nian forkuron, la sekvantan tagon ni ricevus porcion da manbatoj fare de la severa direktoro. Sed ni estis alkutimiĝintaj al ili kaj ne timis.

Antaŭ ol atingi la riveron, ni jam senvestiĝis kaj kun rivalkurado sur la herbejo, venis al la bordo kaj nin ĵetis en la malvarmetan akvon, kune kun la timigitaj ranoj.

Longan tempon ni plaŭdis en la pliiĝinta rivero, ludis, dronis, kiel sovaĝaj anasoj en la tegolkolora malklara akvo kaj grimpis kiel ranidoj sur la sabloza fundo. Iuj el ni kaptis fiŝetojn kaj kankrojn en la rifoj ĉe la bordo. Krioj, bruoj, plaŭdo kaj akvaj gutoj flugis ĝis la ĉielo.

La ĉefo de la grupo sendube estis Stojĉo.

— Haltu! Haltu! — kriegis li kiom lia voĉo povis elteni. Sur lia malgranda, fleksebla korpo malsuprenfluis akvo. — La mikroboj de la mallaboremo jam estas dronigitaj. Ĉiuj sur la bordon! Ha-io-o! . . kaj li ekkuris la unua al la bordo, eriginte la akvon je miloj da gutoj, nazbruante kiel ĉevalo.

Kroĉinte sin sur la akra pinto de la alta poplo la senmova suno rigardis nin kun ĝoja vizaĝo. Ĝi pinĉis ĝis doloro nian bruligitan ĉokoladan haŭton per siaj ardaĵ radioj. Sur ĝi algluiĝis brulantaj sablaj grajnoj.

— Haltu! Ĉiuj tien ĉi! — komandis Stojĉo.

Ni viciĝis ĉirkaŭ li: Peŝo Micin, Vasko Docin, Goŝo Benovija, Vanĉjo Vrĉ kaj la ceteraj samklasanoj.

— Ni ludu „porkon“.

— Hura-a!... ekkriis ni ĉiuj unuvoĉe.

— Mallaŭte, mallaŭte! — kaj turninte siajn musajn okuletojn en rondo li ekkomandis:

— Vi, Vanĉjo, Goŝo kaj Peŝo, kuru en la salikaron kaj detranĉu vergojn. Ni serĉos porkon kaj elfosos la truojn. Ĉu ne? Ho-op!...

Ni diskuris kiel timigitaj birdidoj sur la herbejo al la salikaro. Post kelkaj minutoj ĉio estis preta. La truoj elfositaj en la sablaro en rondo kaj en la mezo unu pli granda. Ĝi estis la porkejo — la loĝejo de la „porko“. Unu malgranda blanka osto, kiel homa pugno, kuŝis en la porkejo. Ĝi estis la porko.

Vasko ekiris ŝanceligante per siaj kurbaj kruroj al la porko, eligis ĝin el la truo kaj levinte sian bastonon demandis:

— Nu, kiu estas la porkogardisto? Ĉar nun mi elirigos el la vilaĝo la porkon al paŝtado.

Apoginte sin sur siaj bastonoj kiel la paŝtistetoj, lasintaj siajn ŝafojn je tagmezripozo, ĉiu ĉe sia truo, ni rigardis nin provokeme. Neniu la unua deziris esti porkogardisto.

Vanĉjo Vre proponis loton. Ni konsentis.

Goŝo Benovija pikis en la ripojn Stojĉon kaj ekridinte, ekkriis:

— Stojĉo estu! Stojĉo sen tio estas „porkisto“.

Ni ekridis ĉiuj pri lia ŝerco.

Ni lotis per bastono. Mi fariĝis „porkisto“.

— „Ŝvinjar“! Vanĉjo „Ŝvinjar“! — kriis freneze ĉiuj al mi.

Vasko saltetis kaj batis la porkon tiel forte, ke ĝi trafajfis preter la kapo de Peŝo kaj ruligis sur la herbejon.

— Kuru por paŝti la porkon!

Pikite en la koro, mi alkuris post la osto kaj frapis ĝin per la bastono. Mi penis enigi ĝin en „la porkejon“. Miaj kamaradoj ankaŭ batis kaj elirigis ĝin „preter vilaĝo je paŝtado“.

Ĉuste ni komencis la ludon kaj de la verda salika bosketo ekŝanceligis kiel granda urso, avo Koli Balev. Sur sia kapo li portis, vintre kaj somere, grandan vilan ĉapon. Kiel pafilo estis hirtiginta sur lia ŝultro, dika, kornusa bastono. Lasinte la ŝafaron, li venis ĉe nin por rigardi la ludon kaj sin apogis sur sia bastono, proksime de la bordo. Duonklinita — lia ombro respeguligis en la malklara akvo. Mi ekgojis vidinte lin. Ofte li kolektis nin ĉirkaŭ si kaj tutajn horojn rakontis al ni jen terurajn, mirindajn rakontojn, jen ridindajn historietojn, jen malĝojajn okazintaĵojn de la militoj kaj de la ribelo en 1923 jaro.

— Do, sufiĉe da ludo! — proponis mi. — Avo Koli rakontos al ni ion. Ĉu ne, avo?

— H-a-a... Prizorgu vian porkon. Nu, vidu lin! Li volas sin liberigi! — ekkriis miaj kunuloj. Mi ekrigardis konfuzite Stojĉon. Mi volis aŭdi ankaŭ lian vorton. Sed li palpebrumetis al mi moke per siaj malgrandaj okuletoj kaj batis forte la porkon. Ĝi saltis, trafugis tra niaj gamboj kaj enakvigis en la mezon de la rivero.

— Ha-ha! — ekridis mi — La ludo finiĝis.

— Ne estas finita! — diris Stojĉo. — Serĉu alian porkon.

Tiun tempon Peŝo fervore fosis per sia bastono en la sablaro ĉirkaŭ iu blanka, ovala objekto. Fine li eligis ĝin kaj jetis ĝin al la truo.

— Jen, mi trovis por vi alian porkon, Vanĉjo. Samtempe pli grasar.

Ni intencis bati la novan porkon, kiam mi aŭdis malantaŭ mi la koleran voĉon de la maljuna ŝafisto.

— Atendu, he azenoj! Je dio timon ĉu vi ne havas? — li ekfrapis per sia dika bastono sur la teron. — Peko estas. Ĉu vi ne vidas! Ja tio ĉi estas homa kranio.

Ni interrigardis nin, mirigite kaj timigite. Ni jetis flanken la bastonojn kaj genufleksis timeme ĉirkaŭ la blanka ovala osto; ni, fiksinte rigardon atenteme kaj kun emocio palpis ĝin.

— C-c-c! — parolis timigite Peŝo.—
el mi ne ekkonis kio estas tio ĉi.

— De kie estas falinta tiu ĉi kranio
ĉi tie? — demandis mi, rigardante al
avo Koli.

— Certe tie ĉi estis iam tombejo,—
diris Stojĉo. Li fleksis kruron, sidigis
sur la sablaron kaj prenis la kranion
en siajn tremantajn manojn.

— He, Ŝvinjar! Kiel vi ne timas?

— Ja, ni multe da ostoj estis elfo-
sintaj tie ĉi en la sablaro! Ĉu ili ĉiuj
estas homaj?

— Mirinda afero!

— Nenio mirinda estas, infanoj.

Ni levis la kapojn. Super ni estis
kliniginta la maljuna ŝafisto. Li tordis
permane siajn pendantajn, grizigintajn
lipharojn. En lia buŝo fumis mallonga,
argila pipeto.

— Rrr-ĉuŝ! — insultis kolere li kel-
kajn ŝafojn, deflankigintajn de la ŝa-
faro, kiu estis amasiginta, kiel grandaj
sakoj antaŭ la akvomuelejo sub la
ombro de unu larĝa saliko.

— Kial, vi gaprigardas? Ĉu vi ne
scias kio okazis tie ĉi antaŭ kelkaj
jaroj? — malplenigante pipeton per
skuado sur sia genuo, li daŭrigis per
malrapida voĉo la rakonton. Tiam oka-
zis tio ĉi. Dum la septembra ribelo.
Kaj multe da murditoj estis enterigitaj
kiel hundoj tie ĉi en la sablaro.

Ĉiuj aŭskultis la vortojn de avo
Balev, rigardante al la timiga kranio.
Mi sentis, kiel mia malseka hararo hir-
tigis. Sur mia dorso, kvazaŭ ekgrimpis
svarmo da formikoj. Goŝo, kiu estis
preninta la kranion en manoj, eniginta
siajn fingrojn en la malhelajn okulajn
truojn, ellasis ĝin apud siaj piedoj,
kvazaŭ bruligita. La okuloj de Stojĉo
nun larĝe malfermitaj, rigardis la kra-
nion per vitreĉa brilo sur la pala vi-
zaĝo.

Vasko turnis okulojn:

— Vidu, sur la frunto estas truo de
kuglo. Kies estas tiu ĉi kranio?

Infaneca, stulta scivolemo. Sed tamen
interesa. Ni levis nazojn al Balev.

Li starigis, apogis sin sur sian bas-
tonon kaj daŭrigis ĉiam tiel per obtu-
za, sufoka voĉo:

— Kiu scias, infanoj! Pluraj estas
ili. He, tia estis tiam la epoko. Kaj
eble el niaj proksimuloj — patro, filo,
frato.

Kaj li turnigis peze, ektrenis la laĉ-
sandalojn, en la sablaro kaj ekflustris
ploreme:

— He, ankaŭ mia filo, infanoj! Kie
li estas jetita?

Li ekŝanceliĝis kiel urso kaj iris al
sia ŝafaro.

Ni staris rigidaj. La nigraj orbitoj
de la kranio rigardis nin terure. Elsta-
rintaj sur la makzelo, sorĉe rikanis al
ni la dentoj.

Subite mi ekkriis:

— Vidu, vidu! Du antaŭaj dento
de la makzelo mankas!

Miaj kunuloj streĉis kolojn kiel ci-
konioj kaj fiksas la okulojn.

Post mia dorso mi aŭdis sufokatan
obtuzan ploron kaj sufokan raŭkadon.
Ni turnis kapojn, surprizite. Stojĉo
staris malantaŭ ni. Lia pala, flava kiel
argilo vizaĝo estis sulkiĝinta kripligite.
Liaj okuloj paliĝintaj terure, rigardis
per la blanko.

— Du dentoj, — plorflustris li —
mankas. . . Ho! Paĉjo! . . . kaj li ŝan-
celiĝis kaj falis sur la kranion, enŝo-
vis vizaĝon en la ardegan sablon, skui-
te de fortaj plorkonvulsioj.

Mi silentigis. Ellasante la ŝtrumpon,
mia patrino ploris. Mi malfermis la
pordon kaj eliris.

Sur la planko restis la faldita letero
de mia kamarado—Stojĉo Ŝvinjar.

„Porko“ — infana ludo simila al hokeo.
* * * Ŝvinjar — porkogardisto

NAŬA DE SEPTEMBRO*

Dum mateno orvelura
vekis sin la granda urb'.
Suno brilis helpurpura,
tra la stratoj eĥis „hura“
kaj mirinda voĉmurmur'.

Interkisis sin la homoj
kaj ĝojkrilis kun jubil'.
Preter ornamitaj domoj
procesiis homkolonoj
en la luma suna bril'.

Kio trafis la popolon,
ke tra stratoj ĝi sin rulas,
ke ĝi bolas, bolas, bolas?

Kion ĝi hodiaŭ volas?
Ĉu ĝi eble somnambulas?

Ho, vekigis ĝi, la brava!
Ĝi leviĝis de l' profundoj.
En suferoj — tuta maro —
ĝi elkreskis fortikstara,
pli hardita per la vundoj!

Tremu vi, faŝistaj bandoj!
Komenciĝis tago hela:
laboristoj, kamparanoj
estos plue la regantoj
de patrio nia bela!

Georgi Dikovski

AŬTUNO

Trankvila estas la arbaro,
bloveto nek, nek movo nun,
surfingre triste kaj amare
promenas lacigita sun'.

Blankvesto ŝanĝos orkoloron
kaj ĉesos lasta murmuret',
kaj birdan pepon, florodoron
enkatenigos frosta ret'.

Sed venos ree la printempo,
ekbrilos hele la lazur'
kaj sub la blua firmamento
eksimfonios la natur'!

Nin ofte rodas la angoro,
animon premas nubaŭtun'
sed sekvas tion ĝojhumoro,
ekridas reviviga sun'.

Violin Oljanov

*La 9-an de Septembro 1944 — renverso de
la faŝista reĝimo en Bulgario



GENERALO CVJATKO RADOJNOV

Cvjatko Radojnov naskiĝis je la 23-a de februaro 1895 en vilaĝo Krân, apud urbo Kazanlâk, en multnombra malriĉa familio. Kiel infano li ne ĝuis senzorgan infanecon. Li studis en la progimnazio de la historia vilaĝo Ŝipka kaj en la Pedagogia Lernejo de urbo Kazanlâk. Tie Radojnov distingiĝis kiel scivolema kaj eksterordinare agema junulo. En la lernejo li fondis marksisman rondeton kaj rekomendis al siaj kunlernantoj lerni Esperanton.

En 1944 Radojnov estis organizanto kaj ĉefa gvidanto de la granda geleranta striko en Kazanlâk.

En la aŭtuno de 1914 Radojnov estas mobilizita en la lernejo por Rezervaj Oficiroj kaj poste partoprenis en la Unua Mondmilito kiel oficiro de 29-a regimento. Sur la bataalkampo li estis konata kiel aktiva kontraŭmilitisto kaj revolucia propagandisto, kiel adepto de Bulgara Komunista

Partio. Pro grava vundo li ne povis partopreni la faman Soldatan Ribelon en 1918.

De 1918 ĝis 1921 Radojnov estis instruisto en la vilaĝoj Ravda, Sveti Nikola kaj Karabunar (nun Grudovo), kie li laboris senlace en la lernejo, en la popola klerigdomo, en la kooperativo „Liberigo“ kaj per marksismaj rondetoj plialtigis la politikan kaj kulturen nivelon de la gevilaĝanoj.

Radojnov rifuzis bapti sian filon Spartak laŭ la ekleziaj ritoj. Tio estis unu el la kulpigoj de la burĝa aŭtoritato kontraŭ li.

En 1921 Radojnov estas eksigita kiel instruisto pro lia komunista agado. Al tio Radojnov respondis per organizo de Komunista Junulara Unuiĝo (Komsomolo) kaj per multnombraj mitingoj kontraŭ la armeo de Vrangel, kiu venis en Bulgarijon kun intenco denove invadi en Sovetunion.

En septembro 1923 okazis la laborist-vilaĝana ribelo, kies organizanto estis Bulgara Komunista Partio. Radojnov ekstaris frunte de 400 ribelantoj. La ribelo estis kruele frakasita. Radojnov devis elmigri en Sovetunion. Dum 1924—1926 j. li estis partia sekretario kaj dum iom da tempo prezidanto de la kamparmastruma komuno en vil. Paraskeevka, gubeŝnio de Poltava, kaj membro de la kontrolo komisiono de la Urba Komitato de VKP(b) en urbo Poltava.

En 1926 j. laŭ la decido de la eksterlanda estraro de Bulgara Komunista Partio Radojnov eniris en la militista akademio „M. V. Frunze“, Moskvo, kiun li finstudis en 1929 kaj kie Radojnov estis membro de la partia komitato kune kun Vatunin, pli malfrue, dum la granda kontraŭnitlerista milito gloriginta soveta generalo.

En 1929—1930 Radojnov estis estro de la stabo por kvalifiko de komandantaro de armeo en Kiev. En 1930—1936 li estis profesoro en la Oficira Akademio „Stalin“ — Moskvo.

En 1936 j. pro la kontraŭevolucia ribelo de la faŝistaj generaloj en Hispanio komenciĝis la civitana milito.

Radojnov eniris unua en la internacian brigadon kaj estis membro de la Estraro de la Hispana Respublika Armeo kaj partoprenis heroe en la bataloj ĉe Madrid, Gvadalajara kaj Ebro en daŭro de du jaroj.

En 1938 li revenis Sovetunion kaj fariĝis kolonelo en la Soveta Armeo kaj denove profesoriĝis jam en la Oficira Akademio „Frunze“.

Post la invado de la hitleraj armeoj en Sovetunion Radojnov eksterleĝe, per submarboato venis Bulgarijon ĉe la enfluejo de rivero Kamĉia — je la 11-a de aŭgusto 1941 por organizi kaj kunhelpi la rezistan movadon en Bulgario. Li sukcesis atingi sian naskivilaĝon Krân, poste vizitis urbon Sliven, denove Krân kaj de tie iris Sofion, kie li fariĝis membro de la Centra Komitato de la Bulgara Komunista Partio. Radojnov ellaboris planon de la bulgara rezista movado kontraŭ la faŝistoj.

Sed je la 25-a de aprilo 1942 la faŝista polico sukcesis lin kapti. La juĝproceso estas konata sub la nomo „juĝproceso de la paraŝutistoj“. De 27 kondamnitaj 18 ricevis mortverdiktan frunte kun Radojnov.

Je la 26-a de junio la kondamnitaj estis mortpafitaj.

La popola regpolenco post la 9-a de septembro 1944 aljuĝis al kolonelo Radojnov postmortan militrangon generalo. Laŭ la decido de CK de Bulgara Komunista Partio en 1959 la naskigdomo de Radojnov estis solene inaŭgurita kiel muzeo.

En la centro de vilaĝo Krân sub la branĉegoj de centjara nuksarbo estas la bronza busto de la vera komunisto, fidela filo de la Bulgara Komunista Partio kaj heroo batalinto por libero kaj feliĉo, generalo Cvjatko Radojnov, vera filo de tri popoloj: bulgara, soveta kaj hispana.

Andrej PÂNĈEV



LINGVA PERFEKTIĜO

Niaj legantoj scias, ke dum la lastaj jaroj en la aperanta en Francio gazeto „Esperanto kaj kulturo“ (kaj franclingva eldono „Esperanto et Culture“), eldonata de la Franca Asocio de Esperantistaj Edukistoj, aperis speciala kurso de Esperanto — serio de lecionoj, verkitaj de At. D. Atanasov-Ada. Multaj bul-

garaj esperantistoj esprimis deziron legi tiujn lecionojn, sed la nomitaj gazetoj ne estas jam haveblaj. La Redakcio de „Bulgara Esperantisto“ ricevis konsenton de la aŭtoro At. D. Atanasov represiĝi sinsekve en la numeroj de la gazeto la menciitan kurson.

La Redakcio

UNUA LECIONO

REKAPITULACIO DE LA ELEMENTOJ GRAMATIKAJ

lernitaj en kurso por komencantoj

Skemo de esperanta propozicio

-a	-o	-as	-e	-an	-on
Malplena	barelo	sonas	laŭte.		
Kleraj	homoj	lernas	rapide	la internacian	lingvon.

Baza vorto — kerno de la propozicio — estas la verbo:

-as esprimas, ke io okazas, io estas farata (aŭ ke io, iu estas en certa stato): *sonas lernas, pliiĝas, tondras, kuŝas.*

Ĉiuj ceteraj vortoj en la propozicio kompletigas kaj klarigas la personon esprimatan de la verbo: *kiu* faras tion (-o), *kia* estas tiu ĉi (-a), *kiel* (klamaniere), *kie* (en kiu loko), *kiam* (en kiu tempo), *kiom* (en kia kvanto aŭ en kia grado) estas farata la ago (-e), *kiu* (aŭ kio) estas objekto de la ago (-on), kian kvaliton havas la objekto de la ago (-an).

Barelo, homo (substantivo en funkcio de subjekto).

Malplena, klera (adjektivo).

Laŭte, rapide (adverbo).

Lingvon (substantivo en akuzativa formo — en funkcio de rekta komplemento).

Internacian (adjektivo en akuzativa formo — epiteto al la rekta komplemento).

La, artikolo.

Verbo

Formoj por esprimi la tempon de la ago (okazo, stato): -as, -is, -os.

Substantivo kaj adjektivo

Formoj por esprimi:

a) La nombron: -o, -oj, -a, -aj. Finaĵo *j* aldonata al la finaĵoj -o kaj -a.

b) La kazon akuzativan (por la rekta komplemento): -on, -ojn, -an, -ajn.

Internacian lingvon, fremdajn lingvojn.

Kio — kiu

Kio estas ĝenerala demando pri io (persono, objekto, ago ktp.). Respondo per *o-vorto* (substantivo):

Kio estas tio? -- Tio estas tablo. **Kio** estas en la ĉambro? — En la ĉambro estas seĝoj.

Kiu individuigas, apartigas, konkretigas unu ekzempleron el pluraj: **kiu** seĝo estas difektita? (El ĉiuj seĝoj, kiuj estas, ekzemple, en la ĉambro).

Nota de At. D. Atanasov-Ada

La lecionoj, represataj nun en „BE“ prezentas fakte duan parton de mia lernolibro „Kurso de Esperanto por bulgaroj“, kiun mi relaboris post ĝia IX eldono. Por respondi al la invito de la redakcio de „Esperanto kaj Kulturo“, mi donis specialan redakcion al la lecionoj de la dua parto, adaptante ilin al la intereso kaj bezonoj de speciala kategorio de legantoj.

En la nuna publikigo mi faras kelkajn rearranĝojn, modifojn, mallongigojn kaj aldonojn en la teksto, konsiderante ĝian destinton.

La komencaj 4 lecionoj enhavas rekapitulacion de la materio, kiu en la manuskripto de la kompleta kurso prezentas la unuan parton de mia lernolibro; la sama materio, tie ĉi prezentita en konciza resumo, estas detale disvolvita en 20 lecionoj, formantaj la menciitan unuan parton.



Kio mi estas? — Homo, Esperantisto. (Esprimas apartenecon al ĝenerala kategorio).

Kiu mi estas? — Atanasov. (Individuigas inter ceteraj homoj, inter ceteraj esperantistoj, ktp.).

Kio ne povas akompani substantivon. Malkorekte estus diri „Kio homo, kio lingvo“, ktp.

Kiu povas esti uzata memstare (tiam ĝi ordinare komprenigas personon), aŭ akompane al substantivo: Kiu venis? Kiu homo venis? Kiu el la kursanoj lernas plej diligente Esperanton? Kiu esperantistoj el via urbo vizitos la kongreson?

Kiu el miaj libroj plaĉas al vi?

Kiun libron vi preferas? — Romanon, sciencan libron, grandan, interesan, franclingvan, ktp. (Demando pri speco de libro).

Kiun libron vi preferas? — La libron „Milito kaj Paco“ de Tolstoj. (Demando pri konkreta, aparta libro).

Pronomoj

Personaj: mi, vi (ci), li, ŝi, ĝi — ni, vi, ili.

Noto. — 1. Uzo de *ci*.

2. Uzo de *li* (por personoj de vira sekso), *ŝi* (por personoj de ina sekso), *ĝi* (por ne-personoj: bestoj, objektoj, agoj, abstraktaj ideoj, ktp.); uzo de *li* kaj *ŝi* por bestoj, kies sekson oni devas nepre difini (ekz. en fabeloj aŭ fabeloj, kie la bestoj estas personigitaj).

Posedaj (estas formataj per aldono de la adjektiva finaĵo *-a* al la personaj pronomoj; havas karakteron de adjektivoj): mia, via (cia), lia, ŝia, ĝia, nia, via, ilia.

Akuzativo

La patro trovis la filo. — *Kiu kiun* trovis?

La patro trovis la *filon* (ne la *filinon*).

La *patron* trovis la filo (ne la *patrinon*).

Noto. — 1. Al la lernantoj devas esti sugestata la rilato KIU-KIUN (KIO-KION);

Kiu kiun vidas?

Kiu vidas? — ... -o.

Kiun (kion) li vidas? — ... -on.

La instruisto povas jam doni ideon kaj klarigon pri transiraj kaj netransiraj verboj.

2. Ordinare en lingvoj, en kiuj ne estas jam diferencaj formoj de nominativo kaj de akuzativo ĉe la substantivoj, la aparta akuzativa formo estas konservita ĉe la personaj pronomoj. Por malkovri la esencon de la akuzativo (ĉe rekta komplemento) al lernantoj de nacioj kun tiaj lingvoj, oni povus preni kiel elirpunkton la akuzativon de la personaj pronomoj: *min*, *cin*, ktp. La lernanto facile komprenos kaj ekmemoros ilin kaj senerare ilin uzos. Plue li devas eksenti, ke kiam oni uzas substantivon kaj ne la respektivan pronomon, la substantivo havos aŭ ne havos finaĵon *n* depende de tio, ĉu en la kazo la pronomo havus aŭ ne havus ĝin:

La patro riproĉos LIN. La patro riproĉos la FILON.

Ekzemploj kaj tipaj frazoj

(Memorotaj kiel modeloj)

-A, -O: Granda kapo, granda ĉapo. Kia homo, tia nomo.

-AS: Kun kia homo vi festas, ankaŭ tia vi estas.

KIO: Ne ĉio utilas, kio brilas.

KIU: Kiu regas per ŝtonoj, tiun oni dankas per bastonoj.

Ekzercoj

1. Substantivoj, adjektivoj, adverboj.

<u>-O</u>	<u>-A</u>	<u>-E</u>
(kiu, kio)	(kia)	(kiel)
patrO	patrA	patrE

Formu laŭ tiu maniero adjektivojn kaj adverbojn de la sekvantaj substantivoj kaj di finu iliajn signifojn: tago, vintro, hejmo, supro, libero.

2. Donu akuzativan formon al la respektivaj vortoj en la sekvantaj propozicioj:

Mi vi salutas.

Kiu vi salutis?

Ĉu li vi vidas?

La hundo persekutas la kato.

Lia fratino vizitas ofte mia onklino.

Johano prenis la libro, sed ne legas ĝi.

Mi skribos longa letero.

(Daŭrigota).



En ĵurnalo „Kolarovgradska borba“ (de 3. I. 1961) aperis artikolo de A. Laborov „Esperanto malfermis al ili fenestron al la mondo“ kun ilustraĵo pri la ĝelernanta kurso ĉe la IX b klaso en la meza politeknika lernejo „Liljana Dimitrova“ en Kolarovgrad.

En la sama ĵurnalo (de 13. V. 1961) de la sama aŭtoro aperis diversaj informoj sub titolo „Esperantaj novaĵoj“ — pri la agado de la esperantistoj en Kolarovgrad.

En ĵurnalo „Iskra“ (Fajrero) en urbo Kazanlák (de 21. I. 1961) — longa informo de Iv. Zahariev sub titolo „La ĵarkunveno de la esperantista societo“. Tre varia estis la agado de la societo. La reprezentanto de la Urba Komitato de Bulgara Komunista Partio k-do Boris Avramov salutis la kunvenon je la nomo de la Komitato kaj esprimis kontentecon pri la bona societa laboro.

En ĵurnalo „Transporten glas“ (de 8. II. 1961) — sciigo, ke ĉiuj esperantistoj-fervojistoj en la lando kontaktiĝu kun la gvidanto de la fervojista sekcio ĉe CK de BEA Mihail Mekikčiev.

En ĵurnalo „Transportna iskra“ (de 28. II. 1961) — artikolo de D. Popov — „El la notlibro de la esperantisto en frata Hungario“ — informo pri la belega ekskurso-gastado de bulgaraj tramistoj-esperantistoj al siaj kolegoj en Hungario.

En ĵurnalo „Zavodska pravda“ (Uzina justeco), organo de la fervojuzino „G. Dimitrov“, Sofio (de 13. III. 1961) — artikolo de Boris Iliev — „Esperanto — fenestro al la mondo“ kun fotografiaĵo de la esperanta kurso ĉe la uzino.

En la sama ĵurnalo (de 22. V. 1961) — anonco pri la solena fermo de la kurso — je 25-a de majo 1961.

En ĵurnalo „Borba“, Tárnovo (de 13. V.

1961) — artikolo de Hristo Manolov „Klubo de la amikeco“ — belega informo pri la varia agado de la internacia klubo ĉe la meza politeknika lernejo en vilaĝo Polski Trámbeš — kleriga centro de internacia kaj komunista edukado de la ĝelernantoj.

En ĵurnalo „Ĉernomorski front“, Burgas (de 19. V. 1961) — artikolo de A. Ĉalákov „Esperantaj leteroj el la Okcidenta Paradizo“, interesa informo pri la revuo „Nuntempa Bulgario“ en fremdlando, pri la reĝimo de Franko en Hispanio, pri la alkoholismo kaj la krimeco inter la junularo en Okcidenta Germanio, pri la vivo en Anglio, pri la pereintaj fratinoj en Algerio, pri la marrestadejo „Suna marbordo“ oni scias ĉe en Svedio.

En ĵurnalo „Oteĉestven zov“, Vraca (de 20 V. 1961) — informo de Il. Borisov kun ilustraĵo — pri la varia agado kaj internacia korespondado de la esperantistoj en Vraca.

En la sama ĵurnalo (de 12. VI. 1961) — informo de Boris Iliev — „La kurso de Esperanto fliniĝis“ kun fotografiaĵo.

En ĵurnalo „Naroden drugar“ (Popola kamarado), Jambol (de 1. VII. 1961) — informo de K. Marĉeva — „La esperantistoj el Jambol kaj Burgas interŝanĝis sperton“, pri la esperantista renkontiĝo je la 24-a kaj 25-a de junio 1961 en Jambol. La reprezentantoj de ambaŭ societoj subskribis kontrakton pri konkurado.

En ĵurnalo „Dimitrovec“, organo de la maŝinkonstrua uzino „G. Dimitrov“ en Ruse (de 5. VII. 1961) — informo pri la nova kurso de Esperanto por kursgvidantoj en vil. Druĵevo, organizita de CK de BEA, gvidata de S. Heŝapĉiev kaj G. Dimov, malfermita je la 23-a de julio 1961 kaj fermita je la 6-a de aŭgusto 1961.

En ĵurnalo „Narodna kultura“ (Popola kulturo) en Sofio (de 8. VII. 1961) — artikolo „Internacia fojro de la libro en Varsovio“ de akademiano Ks. Ivanov. En ĝi interalie la aŭtoro rakontas pri la riĉa kolektaĵo de esperantaj libroj en la fojro.

ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

La ĉeĥoslovaka Ministerio de instruado kaj kulturo invitis funkciulojn de esperantistaj societoj kaj instruontojn por feraj kursoj de Esperanto al tritaga kurseto. Ĝi okazis en la tagoj 25—27 de junio en la montara hotelo Solarka sur la monto Ondrĉejnik (Beskidoj) apud Frydlant nad Ostravici, en turisme bela kaj interesa regiono, en alteco de 800 metroj super la marnivelo. La kurseton partoprenis ĉ. 60 funkciuloj kaj instruontoj. La kostoj de loĝado kaj manĝado de ĉiu partopreninto, estis pagataj el la buĝeto de la ministerioj, la vojaĝkostojn pagis parte la ministerio, parte la societoj, kiuj delēgis la funkciun. En

interesaj prelegoj la kursanoj ricevis konojn pri la movado por sendependeco de latin amerikaj kaj afrikaj ŝtatoj kaj pri la ĉeĥoslovaka kultura politiko rilate al tiuj landoj. Oni pri-diskutis la situacion de la E-movado en ĈSSR.

Ĉi tiu kurseto estis dokumento de tio, ke la ĉeĥoslovaka socialisma respubliko ŝatas la laboron de la ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Kaj ĉi tiuj siavice estas dankaj al sia ŝtato pro ties intereso, kiu montras, ke Esperanto estas faktoro kalkulinda. Ili promesas, ke ili laboros ankoraŭ pli fervore por bone informi pri sia patrujo la fremdajn landojn.

Josef Chvosta



ROZINO. Per monrimedoj de memvola imposto kaj libervola laboro en v. Rozino, distr. de Plovdiv, estas konstruita distrikta malsanulejo, kiun la loka loĝantaro baptis je la nomo de la kreinto de internacia lingvo Esperanto D-ro L. L. Zamenhof. Nun oni konstruas grandan parkon ĉirkaŭ ĝi kaj en baldaŭa tempo ĝi estos malfermata.

Situata sur la deklivo de la Balkano, ĉirkaŭata per rozaj ĝardenoj la nova malsanulejo „D-ro Zamenhof“ de malproksime similas al blanka birdo sidiginta en la verdaj kvadratoj de la Roza Valo.

Nur post kelkaj monatoj en la nova malsanulejo eklaboros blankvestitaj kuracistoj, fleĝistinoj k. a. oficistoj. Je la nomo de granda humanisto d-ro Zamenhof ili kuracos la homojn, savos ilin de teruraj malsanoj por ke ili vivu feliĉe en tiu bela valo.

Tien ĉi ĉiujare dum la festo de la rozoj, kiu okazas en la fino de majo aŭ en la komenco de junio venas esperantistoj de la tuta lando kaj el eksterlando por ĝui la belegan naturon. Nun ili estos des pli kontentaj, kiam vidos la nomon de d-ro Zamenhof sur la nova malsanulejo.

A. Tanev

VARNA. Sukcesplene finiĝis la kursoj de Zora Mladenova, Mara Aleksandrova, Georgi Dimov, Elisaveta Ruseva kaj Elisaveta Vasiljanska.

Ĉiutage la klubo estas plenplena de varnaj kaj alilandaj ĝesperantistoj. La paĝoj de nia „Ora Libro“, komencita de 1936 pleniĝis je la impresoj de niaj karaj gastoj. La albumo komencita en 1958 jaro dum la glora 33-a Bulgara Esperanto-Kongreso en Varna, abundas je bildoj, kiuj ilustras nian Esperanto-agadon.

Baldaŭ ni havos novan klubejon, ĉar la ĝisnuna estas jam tro malgranda por nia vigla porpaca Esperanto-laboro.

Georgi Dimov

KJUSTENDIL. La 23-an de julio 1961 mortis nia kara k-do Petăr St. Minev, unu el la fondintoj de societo „Flamo“ en Kjustendil.

RUSE. Grupo da 15 gejunuloj partoprenis someruman esperantistan renkontiĝon en Gdansk (Pollando). Tiu ĉi ekskursiva ferio estas rekompenco pri ilia aktiva agado.

Dum tiu ĉi somero multaj eksterlandaj esperantistoj traveturis nian urbon. Multaj vizitis nian klubejon. Ni akompanas ilin, helpante konatigi al ili la vidindaĵojn de nia bela urbo kaj lasi agrablajn rememorojn pri la restado en nia lando.

Boris Kavalĝiev

JAMBOL. Dum julio tie ĉi okazis renkontiĝo de la ĝesperantistoj de Jambol kaj Burgas. Ĝi estis malfermita de Dimo Trudoljubov, prezidanto de la esperanta societo „Maksim Gorkij“ Jambol. Anastas Ĉalakov, membro de CK de BEA el Burgas, salutis la ĉeestantojn kaj esprimis deziron pri pli ofta okazigo de similaj Esperanto-festoj. Li komunikis la ĝojan sciigon, ke la 35-a kongreso de la bulgaraj ĝesperantistoj okazos en Burgas dum 1962 jaro.

En la dutaga restado la gastoj vizitis la vidindaĵojn de la urbo kaj ankaŭ belajn ĉirkaŭaĵojn. Sub la jarcentaj arboj entuziasmige sonis la versaĵo de Zamenhof „La vojo“ recitata de Nikola Valkanov. La renkontiĝo pasis agrable kaj enverŝis en la korojn de la ĉeestantoj novajn fortojn kaj entuziasmon por laboro.

Dimo Trudoljubov

POLSKI TRÂMBEȘ. Fondita laŭ iniciato de instruistoj kaj lernantoj—esperantistoj, nia ĝelernanta laboro kooperativo „Zamenhof“ prilaboras 30 hektarojn da tero. Por daŭrigi la necesajn laborojn ankaŭ dum la somero, ni organizis junulan brigadon. Sesdek ĝelernantoj el Polski Trâmbeș, el kiuj la duono estas esperantistoj, entuziasme plenumas sian devon. En daŭro de 10 tagoj ili ĉirkaŭfosis dufoje la maizon, unu foje—la kotonon kaj la racinon. Krome la brigado manipulasi ĉirkaŭ 10.000 kilogramojn da tomatoj, kaj aliaj legomoj por eksporto, helpis la konstruon de novaj lernejoj kaj kabinetoj k. a.


Timaniere la brigado de kooperativo „Zamenhof“ kontribuis al la pli ĝustatempa prilaboro de la tero, al la pli rapida kaj malkara preparo de la lernejo por la nova lernejo. Ni produktis ĉi-somere po 400 kg. da greno de unu dekaro — pli multe ol la kooperativo de la plenaĝuloj produktis.

Ni ne forĝis ankaŭ la parkon „Esperanto“ (donata je nia dispozo de la popola konsilantaro) kaj ankaŭ dum la somero prizorgas ĝin ŝparante la monon kaj la zorgojn de la soveto.

La farita laboro egalas nur por 10 tagoj je 9.000 levoj.

Ĥr. Manolov

Soffo. La 17-an de aŭgusto k. j. la membroj de la Konstrua Komitato: N. Nikolov kaj L. Mladenov kun reprezentantoj de Sofiaj Esperan-



to-Societoj: C. Murgin kaj St. Moraresku vizitis la Departementon „Lesoparkove“ de Sofia. Urba Konsilantaro por trakti la problemon pri finkonstruo de la montodomo „Esperanto“ sur monto Vitoŝa.

En la kunsido respondecaj personoj el „Lesoparkove“ admonis nin ke la montodomo devas esti finkonstruita plej malfrue en la laborsezono 1962. Se ni ne povus daŭrigi la konstruadon kaj ekipigon de la montodomo la Urba Konsilantaro forprenos niajn rajtojn kaj senrekompence transdonos ĝin al iu alia organizaĵo, kiu povas daŭrigi la finpretigon de la konstruaĵo. La Urba Konsilantaro, kiel ĝis nun estas preta liveri al ni senpage la necesajn konstrumaterialojn kaj ni devos helpi per volontulaj laborbrigadoj kaj pago al la dungitaj laboristoj. Kvankam ni ne havas nun sufiĉan monon ni konsentis subskribi la kontrakton firme konvinkitaj, ke la esperantistaj societoj kaj ties membraro malavare kontribuos per mono kaj laboro por ke la montodomo estu preta por ekspluatado en la fiksita periodo. La unuaj petoj pri monhelpo pravigis niajn esperojn. Jen nova listo de donacintoj:

Fervojista Esp. Societo	Sofia	400 lv
Poŝtista Esp. Societo	„	300 lv
Turista Esp. Sekcio	„	150 lv
At. Lakov	„	300 lv
Iv. Daĉev	„	100 lv
At. D. Atanasov — ADA	„	25 lv
T. Dimitrov	„	25 lv
D-ro Iv. Milev	„	20 lv
J. Vlasov, USSR	libroj por	15 lv
Jaŭda Rondo, Japanio	„	5 lv
Pola esperantisto	„	12 lv

Entute: 1352 lv

Koran dankon al ĉiuj donacintoj.

Geesperantistoj, la montodomo „Esperanto“ ni ekkonstruis por honorigi d-ron L. Zamenhof



Volontula esp. labor-brigado ekspedita № 6 de „Bulgara Esperantisto“.

okaze de la 100-jara datreveno de lia naskiĝo. Helpu malavare ĝian efektivigon.

La Konstrua Komitato de Montodomo „Esperanto“

EN SAMOKOV



K-dino Ĥr. Veceva disdonas premiojn al la plej diligentaj lernantoj.

BURGAS. Belega estas nia lando! Printempe — kun la florantaj ĝardenoj, somere — kun la lazura maro; kun la arboj, kiuj fleksas branĉojn pro abunda fruktaro, kun la legomĝardenoj, kiuj malavare rekompencas la laboremajn kooperativanojn.

Riĉan rikolton kreskigis tiun ĉi jaron la kooperativanoj de agrarmastrumo „Ĥr. Botev“ kun centro urbo Burgas. Nun oni rapidas kolekti la frukton de sia kolektiva laboro.

Helpe al ili venis la esperantistoj de la Esperanto-societo „Nigra Maro“ en Burgas.

La esperantistoj kolektis pli ol 600 kg. da legomoj. La kooperativanoj restis tre kontentaj kaj dankaj pri la farita laboro.

Ĝajaj kaj feliĉaj estis ankaŭ la esperantistoj.

Nvart Nigoŝosjan



MONTO DE LA VIRINO,

p. 95, Hanojo — 1959,

Demokratia Vietnamia Respubliko

La libro enhavas 13 vietnamajn popolajn legendojn, respegulantajn la modestecon, la honestecon kaj la laboremon de la vietnama popolo.

En la unua legendo — „Monto de la virino“, per kiu estas titolita la libro mem, oni rakontas pri paro de gefratoj — knabo kaj knabino. Ili ĉiutage helpis al siaj malriĉaj gepatroj, sed pro malfeliĉa okazintaĵo ili disiĝis. La frato iris en malproksiman landon. Pasis multaj jaroj, la gepatroj mortis kaj la restinta orfa filineto fariĝis dungita servistino en iu malproksima lando. Tie hazarde la frato kaj la fratino renkontiĝis nekonante unu la alian. Ili geedziĝis kaj post unu jaro ili havis infanon. Iun tagon la edzo neatendite eksciis, ke lia edzino estas lia fratino. Pelata de konsciencia riproĉo, li forveturis malproksimen. Forveturinte, li jam ne revenis hejmen. La edzino kun sia infano ĉiutage atendis sian edzon, sed vane. La genio por eternigi la sopron de la virino al ŝia edzo ŝtonigis ŝin sur monto-pinto apud la maro.

En la dua legendo „La karambolarbo“ ni vidas du fratojn. La pli aĝa frato estis mallaborema, avara, malhonesto. La pli juna estis malriĉa, sed tre laborema, honesta kaj bonkora. Kaj ia stranga providenco per karambolarbo havigis al li diversan havaĵon, sed li kune kun sia edzino daŭre estis laborema kaj modesta. La mallaborema frato enviis sian fraton kaj petis ke li komplezu al li per la karambolarbo por ke ankaŭ li fariĝu riĉa. La juna frato konsentis kaj donis la arbon. Laŭ la sa-

ma maniero riĉiĝis ankaŭ la avara frato. Li tamen restis avara kaj mallaborema homo. Pro avareco kaj mallaboremo la bonstato perdiĝis lin.

En la „Oraj amikoj“ oni rakontas pri la fideleco inter du amikoj, kiel en la plej pezaj kaj komplikaj momentoj ili helpis unu la alian.

En „La unua moskito“ — fabelo temas pri geedza paro. La viro estis honesta kaj laborema, sed lia tre bela edzino tutan tagon nur zorgis pri sia tualetu tuŝante nenian laboron. Ŝi ĉiam pretendis, ke per ŝia beleco ŝi povus edziniĝi al pli riĉa homo. Ŝia edzo senĉese ĉiel penis kontentigi ŝin. Hazarde ŝi mortis. Pro malĝojo kaj turmento la edzo ne enteriĝis ŝin. Ĉiutage li rigardis ŝin. La homoj, iuj kompatis, aliaj primokis lin. Li vendis sian havaĵon, aĉetis ŝipeton, enŝipigis sian mortintan edzinon kaj forveturis trans la marojn por serĉi la paradizon aŭ la insulon de la senmortaj por ke oni revivigu ŝin. Efektive oni revivigis ŝin. Eksciante pri sia edzo ke li estas jam pli malriĉa kaj ŝi fariĝis pli bela, ŝi forlasis lin.

En alia legendo oni rakontas pri la amo inter du fratoj. Post edziĝo de unu frato, la alia sentis sin izolita kaj foriris malproksimen. Pro malĝojo, malsato kaj laco li mortis. En la nomo de lia frata malĝojo la genio ŝtonigis lin figure. Post certa tempo la edziĝinta frato ekserĉis sian fraton. Vagante kaj serĉante, laca kaj malsata, li atingis sian ŝtonigitan fraton kaj mortis apud li. Lia edzino siaflanke, sopirante pri sia edzo, post longa serĉado trovis lin ŝtonigita, ĉirkaŭprenis lin kaj mortis. En honoro de la triopo oni konstruis templon.

Laŭ enhavo ĉiuj legendoj kaj fabeloj estas similaj, en orienta stilo. Ili estas originale rakontitaj en eleganta stilo de Esperanto. La libro estas tre interesa por komencantoj kaj progresintoj.

Nano Nanov

REDAKTA KOMITATO

Canko MURGIN (respondeca redaktoro), Atanas LAKOV, Ivan SARAFOV,

Kiril DRAĴEV, Simeon D. SIMEONOV, Violin OLJANOV,

Korektis: D. Ĉolakov

Formato 71 × 100/16

Eldonkvanto 3000 ekz.

Adreso: Bulv. Dondukov 57, Tel. 7-46-01, Sofio, Poŝtkesto 66

Ŝtata presejo „T. Dimitrov“, filio 2 — Sofia; mendo № 7476/61

*Jus aperis kiel
eldono de Ŝtata
Eldonejo „Nauka
i Izkustvo“ — Sofio*

БЪЛГАРСКО-ЕСПЕРАНТСКИ РЕЧНИК
(BULGARA-ESPERANTA VORTARO)

*Aŭtoroj: Atanas D.
Atanasov, Iv. Sa-
rafov, As. Simeo-
nov, Dim. Simeonov.
Tole bindita, pa-
pero luksa, p. 630,
aĉetebla ĉe la ŝta-
taj librovendejoj,
prezo 31,40 levoj.*

*Ĉiu bulgara espe-
rantisto bezonas
la jus eldonitan
valoregan libron*

СВЕТЪТ ИМА МЕЖДУНАРОДЕН ЕЗИК
(LA MONDO HAVAS INTERNACIAN LINGVON)

*Aŭtoroj: Ivan Sarafov
kaj Stefan Masarov.
Paĝoj 98, prezo 5 levoj,
havebla ĉe la lokaj esp.
societoj kaj ĉe Bulgara
Esperantista Asocio, poŝt-
kesto 66, Sofio, Bulgario.*

